/Internacia anarkiemula renkontiĝo /

En Venecio kolektiĝos la 24-30 sept. 1984 anarkiemuloj el la tuta mondo. La centra precentado en la programo estos seminario sub la resuma signo : "1984 : aŭtoritatecaj tendencoj kaj liberecanaj klopodoj en la nuntempa socio". La arangantoj estas : "Centro por liberecanaj studoj en Milano" kaj "La Anarko-instituto de Montrealo".

Laŭ la primara tagordo okazos du plenkunsidoj, la unua havos la temon : "La ŝtato", la dua "La anarkio".

Intertempe okazos gruplaboroj pri diversaj temoj el kiuj estas menciindaj : "memmastrumado en la praktiko", "feminismo kaj anarkiismo", "la eblecoj de la anarki-sindikatismo", "ekologio" kaj "revolucio" (la lasta temo devus inter alie doni respondon al la demando, ĉu la revolucio estas nepra elemento en la liberecana ideologio, aŭ ĉu estas kvazaŭ rita postvivaĵo ?).

Ne formalaj interrilatoj inter la partoprenantoj estos realigeblaj en "bela piazo" kie oni povos manĝi, trinki kaj interbabili. Tie ankaŭ estos internacia liberecana librofoiro kaj ekspozicio pri la temo "Arto kaj Anarkio". Pri tiuj kontribuoj respondecos "La internacia centro de esplorado pri anarkiismo" (CIRA Ĝenevo).

La arangantoj vokas al interesuloj pri mona kontribuo. Inter alie la simulta-interpretado al la itala, angla, franca, hispana kaj serbo-kroata lingvoj estas ege multekosta.

La adreso al la arangantoj estas :
Centro Studi Libertari
Viale Monza 225
I - 20126 Milano.

(P.P. kompilis el "Arbetaren")

P.S.
Ni liberecanaj ge-esperantistoj havas senliman laborkampon rilate la esperantistigon de la "Liberecana Mondo". Kiam ni povos legi en la Liberecanaj medioj, kiel dum nia 57-a SAT-kongreso en Bordozo, la devizon : "Internacia (sennacieca) kongreso sen interpretistoj" ?
Espereble ke la L.L.-legantoj en la mondo sendos salutpoŝtaĵon al la liberecana renkontiĝo en Venecio, kaj uzos esperanton, kaj klare indikos ke estas nia lingvo kiu estas uzata sur la poŝtaĵoj.

P. Pelle



LINNE (1707 - 1778). Unue "fiksisto", li sin demandas, ĉu li ne konstatis ŝanĝiĝojn ĉe certaj vegetaĵoj (verbeno, kardo) : "Mi longe suspektis kaj mi kuraĝas proponi nur kiel hipotezon ke ĉiuj specioj el sama specaro konsistigis ĉe la origino nur unu saman specion kiu diversiĝis pro hibridiĝado".

Dum la 18a jarcento la filozofoj provos malmistifiki por krei sciencan klimaton.

MAUPERTUIS (1698 - 1759) klarigas siamaniere la mekanismon de la formado de la feto. Laŭ li, en la patra semo samkiel en la patrina ekzistas nevideblaj organaj elementoj (eroj kiuj formas la okulojn, eroj kiuj formas la cerbon, eroj kiuj formas la koron k.t.p.) kaj tiuj elementoj kuniĝas. Sed kial tiuj eroj kuniĝas laŭ certa ordo ? Laŭ MAUPERTUIS ĉiu ero estas dotita per kvazaŭ memoro, instinkto. Pere de tiu teorio li klarigas la monstrecon : la monstreco estas ĉu maloportuna kuniĝo de la spermaj elementoj, ĉu troeco aŭ manko da spermoj kaj la monstreco estas transigebla.

Sed plie MAUPERTUIS klarigas ankaŭ pere de tiu teorio la "evoluon" : "Ĉu ne eblus klarigi per tio kiel la multobliĝo de eĉ plej malsimilaj specioj estus povinta okazi ekde nur unu paro ? Tiuj specioj estus ŝuldintaj sian originon al nur kelkaj hazardaj produktitaĵoj, en kiuj, la fundamentaj eroj estus preterlasintaj la vicon kiu ĉeestis iliajn geantaŭulojn; ĉia misviciĝo estus estiginta novan specion kaj iom post iom pro tiuj diferencetoj estus ekestinta la grandega malsimileco inter la nunkonataj bestoj."

Dum MARCHANT kaj LINNE pensas ke ĉiuj specioj el sama specaro estas samdevenaj, MAUPERTUIS pensas ke ĉiuj specioj estas iel samdevenaj.

Laŭ MAUPERTUIS okazas ke kelkaj elementoj el iu specio malsimilas aliajn. Iom post iom alia specio naskiĝas : "Unue ili estis nur hazardaj kazoj, la natur-kreemo kaj la sinsekvaj generacioj igis ilin specioj". Efektive MAUPERTUIS antaŭvidis mutaciismon kaj li estas konsiderata nun kiel pioniro de tiu teorio.

Li pensas, ke ankaŭ la eksteraj kondiĉoj povas evoluigi la speciojn kaj li demandas sin ĉu la ŝanĝiĝoj kaŭzitaj pro tiuj eksteraj kondiĉoj estas transigeblaj.